

D-ro L.L. Zamenhof
(1859-1917)

# NORDA GAZETO

Dumonata Bulteno
de la
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Informilo n-ro 6/288 (4I-a jaro)
- novembro, decembro I98I -

Redaktoro kaj responda eldonanto:
S-ro Lucien BOURGOIS
25, rue Gambetta
62950 Noyelles-Godault
(tél: -2I- 20.23.32)

Tarifo de kotizoj:
40FF: aktivaj membroj
30FF: membro-abonantoj
25FF: junuloj kaj pensiuloj.
pagendaj al:
Fédération espérantiste du nord de la France.
25, rue Gambetta
62950 Noyelles-Godault

Per poŝta ĉeko:
Lille 5I7-I5 G en la nomo de la federacio sendenda rekte al la kasisto:

S-ro Fernand DITACROUTE
Rond-Point Jean Jaurès
24430 Razac-sur-l'Isle.

Sekretario:
S-ro Robert LEFEBVRE
I, rue César Willefert
62II0 Hénin Beaumont
(tél: -2I- 20.37.75)

## KOMUNIKO DE FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO
### Listo de la sukcesintoj 1980/8I

ATESTO PRI LERNADO:

ARNAUD Béatrice
BOUTEMY Thierry (B)
BRIOIS Patricia (B)
CARETTE Rose-Marie (TB)
CARETTE Thierry (TB)
COSTE jean-Michel (SB)
COSTE-LEFEVRE Sim. (B)
DAVID Daniel . (TB)
DAWSON Alain (TB)
DECOBERT Jean (TB)
DEMAZY Monique (SB)
DUYCK Dominique
HALLYNCK Philippe (SB)
HENEL Yvon (B)
HERMANS Henri
JULHES Michel (TB)
KMIECIK Daniel (B)
LECOCQ Christine (TB)
MASSON Michel (SB)
REUBRECHT Isabelle (SB)
REUBRECHT Josiane
REUBRECHT José (SB)
ROUCHETTE Vincent (SB)
VASSEUR Jacqueline

ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO :

DAVID Daniel (B)
DECOBERT Hélène (TB)
DECOBERT Jean (SB)
JULHES Michel (B)

ATESTO PRI KAPABLECO

DOYE Daniel (B)

Sincerajn gratulojn al ili kaj al la kurs-gvidantoj...
La federacia estraro kaj la direktorino de la ekzamencentro: Jeanine VINCENT.

AL NIAJ LEGANTOJ: Pro grava altiĝo de la preskostoj, ni estas devigataj altigi la abonprezon (vidu ĉi-flanke) de nia bulteno.
Ricevos ĝin nur tiuj, kiuj pagos la jenajn kotizojn: 40FF, 30FF aŭ 25FF.
Dankon pro via subteno...

Mondonacoj por la PROPAGAND-FONDUSO estas dankeme akceptataj.

Montant des cotisations I982 : ne plus s'adresser au trésorier fédéral mais directement à: U.F.E. 4 bis, rue de la Cerisaie - 75004 Paris
- C.C.P.:855-35 Paris -

Cotisations à l'association nationale U.F.E.

- membre simple UFE 40FF
- membre abonné UFE I25FF
- membres abonnés (couple) I90FF
- membre de moins de 26 ans, abonné: 85FF
- membre "Club du centenaire" I25FF (I)

Cotisations à l'association universelle U.E.A.

- M.J.K kun jarlibro kaj "Kontakto" 54FF (ĝis 25 j. inkluzive)
- M.J. kun jarlibro 54FF (pli ol 25 j.)
- M.A.K. (jarlibro, "Kontakto" k "Esperanto": I35FF (ĝis 25 j. inkluzive)
- M.A. kun jarlibro + "Esperanto" I35FF (pli ol 25 j.)
- Aldono por "Societo Zamenhof"(S.Z.)270FF
- D.M. (Dumviva membro) 3375FF
- S.A. (Simpla abono al "Esperanto") 8IFF

(I) Les membres s'engagent à verser pendant 5 ans, une somme égale à une ou plusieurs cotisations supplémentaires.

---

Bonvolu korekti (antaŭa bulteno)
paĝo 8, linio 2 de supre: ne "Proverbaro franca-Esperantista" sed: "Proverbaro franca-Esperanta".
linio 4, de supre: ne "evengelio" sed evangelio.

---

Kiu povus helpi? La hispana Esperanto-Muzeo posedas jarkolektojn de "Norda Gazeto". Tamen mankas la jenaj numeroj:
I969: I kaj 3 ; I976: I kaj 6 ; I977: I kaj 2.
Se vi disponas tiujn numerojn, bonvolu informi S-ron Lucien BOURGOIS.

## DIVERSAĴOJ

Tagon post tago progresas la gazet-kolekto ĉe la E-fondaĵo C. VANBIERVLIET en Kortrijk (Belgio) Krom la multaj libroj, la urba biblioteko posedas:
I484 malsamajn gazetojn kaj revuojn en la internacia lingvo.
3879 kompletajn jarkolektojn (el kiuj 2358 binditaj volumoj).
3363 jarkolektojn ankoraŭ kompletigotajn.

---

Dum estado en Belgio kaj Francio Abderrahman GRINE, U.E.A.-delegito en Zaouit-el-Arabe (Tunizio), renkontis E-amikojn. Siaflanke Claude MARTINS, dum profesia vojaĝo en Ĉeĥo-Slovakio, vizitis E-klubanojn en Prago.

---

Meze de septembro okazis en Bruĝo (Belgio) ekspozicio pri la plej diversaj ŝatokupoj por gejunuloj kaj plenaĝuloj, kun budo pri Esperanto.

---

En Dortmund (FRG), moderna maljunulejo ricevos la nomon de l'iama ĉefurbestro, esperantisto, kiu plurfoje vizitis Amiens (Francio). Temas pri S-ro Dietrich KEUNING.

---

La francaj telefonlibroj publikigas i.a. adresojn de E-instruantoj; (ekz. 6 en norda departemento).

---

La novjorka urbestro Edward KOCH solene deklaris la semajnon I2.I8.VII "Internacia Amikeca E-Semajno". Tiu-ĉi proklamo okazis lige kun la 29-a kongreso de la Esperanto-ligo de Nord-Ameriko.

---

En Paderborn (FRG), miloj da korespondaĵoj surhavas la afrankstampon kun dulingva teksto jena:
"Se temas pri lingvoj... Esperanto-Centro, ĉiam la ĝusta partnero".

---

Fine de septembro okazis en Lille (Francio) esperantlingva seminario pri "La rajtoj je lingvo kaj komunikado kiel homaj rajtoj".

Okaze de la turisma ralio, kiu en septembro traveturis la belgan vilaĝon Solre sur Sambre, partoprenantoj vizitis F-inon BLAMPAIN sekretario de la loka E-grupo kaj petis informojn pri la internacia lingvo Esperanto, ĝia aŭtoro, ties naskiĝdato, profesio, forpaso, la celoj de Esperanto, k.t.p...

---

Vojaĝo al Ĉinio gvidata de ĉinaj esperantistoj okazos de la I5-a de aŭgusto ĝis la 4-a de septembro I982. Informas M.P. DENIS - 5, chemin de Blamecourt - 55000 Bar le Duc (sendu afrankitan koverton por la respondo).

---

Nia sekretario : Robert LEFEBVRE estis la venkinto de la ĉi-jara konkurso SIMONDETTI de O.R.E. (Ornitologia Rondo Esperantlingva) kies organo estas "la Mevo".

En Parizo, ĉe kultura centro Pompidou, eblas senpage eklerni Esperanton kaj 74 aliajn lingvojn.

---

La kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista okazos en Lille (Norda Francio) de la I7-a de julio ĝis la 23-a de julio I982.
Temo: "La Paco". Aliĝkotizo 50FF pĉk Lille Esperanto 3I3 I7 K Lille.
Inf. L. BOURDON - 7, avenue Salomon F-59800 Lille.

---

Merkredon, la 7-an de oktobro, franca Televido (TF I) prezentis kadre de junulara programo, aktualajn demandojn kaj respondojn pri Esperanto. elsendo: "Les langues de l'an 2000".

---

La 67-a Universala Kongreso de E-o okazos en Antverpeno (Belgio), de la 24-a ĝis la 3I-a de julio I982.
Inf. U.F.E. 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 Paris.




## RADIOELSENDOJ KAJ NI

Radio F.I.L. (Lille) plurfoje elsendis informojn pri la trisemajna E-ekspozicio, aranĝita de la urba biblioteko (9.X.8I).

---

Radio-Lille/Fréquence Nord disaŭdigis, la I9-an de septembro intervjon de A. DAWSON pri E-o kaj TEJO-seminarioj.

---

La 23-an de septembro, libera Radio Lille elsendis de la 22-a 30 ĝis la 24-a pri la pikarda lingvo kaj Esperanto. Partoprenis la programon gejunuloj el kvin landoj.

---

Finfine, Esperanto reaŭdiĝas sur la francaj antenoj. Post multjara buŝumado, ree okazas regulaj E-elsendoj ĉe Franca Radio.
Jam "Fréquence Nord" iniciatis ĉiumonatan programon (la 3-an lundon, je la horo I9-a kaj 20).
Denove atingis nin la ĝojiga sciigo jena: "Libera radio en la pariza ĉirkaŭaĵo laŭ ondolongo MHz 89,6 promesis paroli pri Esperanto ĉiun vendredon, de la 20-a ĝis la 2I-a. Vi povas telefoni dum la elsendoj ĉe I6.I.262.905I, ekster la elsendhoroj ĉe I6.I.805.3408."
(Laŭ Franca Esperantisto)

---

## TRISEMAJNA EKSPOZICIO EN LILLE

La studenta rondo - Groupe Lillois d'Action pour l'Espéranto - organizis de la 24-a de septembro ĝis la I7-a de oktobro ekspozicion pri Esperanto en la centra urba biblioteko de Lille (vidu foton I, ĉi flanke).

La prezidanto de G.L.A.E. - Yvon HENEL - kun la helpo de kelkaj membroj, mem pretigis 23 afiŝojn pri la internacia lingvo.
Ni ankaŭ ekspoziciis librojn kaj revuojn el multaj landoj. Krome, la biblioteko mem posedas librojn en Esperanto, kiujn prof. G. WARINGHIEN donacis antaŭ 45 jaroj.
Pli ol 50 personoj ĉeestis la oficialan inaŭguron (nia foto).
Okazos sama ekspozicio en la Universitato Lille III. Poste, aliaj kluboj povos pruntepreni la afiŝojn por aranĝi ekspoziciojn en siaj urboj.
Informas Yvon HENEL, 34 rue Lydéric - 59800 Lille.

Nicole GILOTEAUX.

## PROVERBARO FRANCA-ESPERANTA

Kompilis : Lucien BOURGOIS , redaktoro de "Norda Gazeto".
Eldonis : Nordfranca Esperanto-Federacio.

Broŝurita, 48-paĝa, el F-to 2I X 29,7. (vidu foton 3 , ĉi-flanke).
Ilustraĵoj de Jean Paul PERU, lerninto ĉe Belartoj en Douai. (foto 2).

Ĝi konsistas el du partoj:
I) la proverbaro : 362 francaj proverboj kun 780 ekvivalentoj.
2) la esprimoj sankciitaj de l'uzado: I68 francaj esprimoj kun 240 ekvivalentoj.

Ĉiuj frazoj estas vicigitaj laŭ la franca alfabeta ordo, kio ebligas tuj trovi la deziratan proverbon aŭ esprimon.
Kiam eble, la kompilinto menciis al kiu famulo oni atribuis la enkondukon de la koncerna proverbo/resp. esprimo, aŭ la biblian referencon.
Paralele, li ankaŭ precizigis la fonton de la Esperantaj ekvivalentoj, plejparte eltiritaj el la "Proverbaro de Zamenhof.
"Konado de proverboj estas necesa por la perfekta konado de la lingvo", diris la kreinto de Esperanto.
Jen nemalhavebla helpilo dudirekta por tiuj, kiuj deziras pliriĉigi siajn konojn en la franca kaj en Esperanto.

popeca prezo: IO FF surloke.
I5 FF afrankite.

por IO ekzempleroj: 80 FF surloke.
IOO FF afrankite.

Mendebla ĉe:
S-ro Lucien BOURGOIS
25, rue Gambetta
F-62950 Noyelles Godault.

CCP Lille II65-87
Madame Bourgois.


Vi ankaŭ povos aĉeti surloke en Lille, okaze de la proksima federacia kongreso.

## PRI LA KRABO KUN ORAJ PINĈILOJ

(vidu : foton 4). Esperantigis ĝin S-ro Hervé GONIN, prezidinto de UFE kaj nuna redaktoro de FRANCA ESPERANTISTO, kaj iniciatis la tuton Claude MARTINS, kiu uzis libron el tiu serio: "La cigaroj de l'faraono" por instigi siajn lernantojn traduki. Gratulinda iniciato, kiu montriĝis fruktodona.
Atentigo: La plej efika propagando estas mendi ĝin rekte ĉe libristo, kiu rilatos kunla eldoninto: CASTERMAN, aŭ turnos sin al pogranda distribuanto el la tradicia komerca retaro.
Alie, ni daŭre restos inter ni, kaj eĉ la fakuloj, nome la librokomercistoj, ne scios, ke ĝi ekzistas en Esperanto.
Se vi tamen ne sukcesos, turnu vin al la libroservo de U.F.E.



★Foto I : ekspozicio pri Esperanto en la centra urba biblioteko de Lille.



★Foto 2 : Proverbaro - ilustraĵoj de J.P. PERU




★ Foto 3 : Proverbaro franca-esperanta de Lucien BOURGOIS




★Foto 4 : "TINĈJO" parolas E-on

## MILANO

## KULTURA SEMAJNFINO ESPERANTISTA

Vojaĝemuloj volonte ĉeestas kulturajn semajnfinojn, kiuj okazas pli kaj pli ofte en Francio kaj en aliaj landoj.
La 24-an kaj 25-an de oktobro, la kooperativo de "Literatura Foiro" organizis esperantistan renkontiĝon en la norditala urbo Milano.
Kun entute 50 lernemuloj funkciis kursoj por komencantoj (P. MARTINELLI), progresantoj (C. GACOND) kaj laborgrupo pri stilistiko (J. VALANO).
Nokta trajno transportis mian filinon kaj min rekte de Lille al Milano, kie ni estadis kvar tagojn.
Ni do havis tempon viziti la urbon kaj kelkajn italajn esperantistojn.



Jen niaj unuaj impresoj pri Milano:
- plej mirinda estis la promenado sur la tegmento de la larĝa, gotika katedralo, kie ĉirkaŭis nin miloj da turetoj, arkoj, pintoj, statuoj kaj ornamaĵoj el blanka marmoro.
- plej ĉarma estis la kabareta vespero, kiam C. PIRON regalis nin per diverslandaj kantoj.
- plej simpatiaj estis la invitoj de tri milanaj esperantistoj al iliaj hejmoj.
- plej interesa estis la partopreno en la labor-rondo, kie ni kune studis la sekretojn de bona stilo.
- plej fremdan etoson ni ĝuis sabaton, dum komuna vespermanĝo en taverno.
- plej surprizis nin la grandaj pluv-ombreloj, kiujn kunhavis multaj personoj, eĉ lernejanoj.
- plej brilega estis la ora altaro en la preĝejo de Sankta Ambrozio.
- plej kontentaj ni forlasis Milanon, mardon vespere...

Lilli GILOTEAUX.

---

## ALIA SEMAJNFINO ... EN ANGLUJO.

Organizita de "Medway Esperanto-Klubo, ĝi daŭris de la 2-a ĝis la 4-a de oktobro kaj havis kiel kadron la katolikan priorejon "The Friars" (la monaĥoj), ĉe Aylesford, apud Maidstone, en graflando Kent.
Tiu konstruaĵo estas pitoreska gastejo kun moderna prelegejo.

Partoprenis 2I gesamideanoj: I2 angloj, 2 skotoj, 3 belginoj kaj 4 francoj.
F-ino VERBEKE prezentis la ekskuzojn de S-ro DIETRICH, el Valenciennes.

Vendredon, la 2-an: La irvojaĝo montriĝis suferiga por la neangloj: la maro estis forte skuata kaj la ŝipo tangadis. Post la alveno de S-ino LINE en Folkestone, S-inoj M. BUCKLE kaj F. RANDALL, ĉiu per propra aŭto, veturigis la belginojn kaj la gefrancojn tra la belaj Kentaj pejzaĝoj al la priorejo. La vespermanĝon sekvis interkona vespero kun ludoj, kantoj, kies muzikon surbendigis S-ro Reg. FILDER, kaj libertema konversacio.
Sabaton, la 3-an: La kongresanoj kunsidis por paroli pri diversaj aferoj i.a.: markolaj kongresoj, varbado, propagando, ktp. La posttagmezo estis libera kaj, sub la pluvegoj, ni vizitis la urbon Maidstone, kaj butikumis.
Poste sekvis varietea vespero kun ludoj kaj mima spektaklo, kiujn prezentis S-ino RANDALL, poemoj, deklamitaj de S-ro DUCROCQ aŭ legitaj de S-ro Frank MAITLAND.
Dimanĉon, la 4-an: Oni laŭvole povis ĉeesti diservon (ne esperantlingvan)
Sekvis ĝin nova kunsido, kun interveno de S-ro L. HARTRIDGE, kiu planis proponojn pri organiza ŝanĝo en la markolaj renkontiĝoj, sed tio kunpuŝiĝas kun la realaĵoj...
Posttagmeze, la kongreseto finiĝis per tombolo kaj ludoj, organizitaj de S-ino Mollie BUCKLE kaj de ĝia kasistino.

Lundon, la 5-an : Mia edzino kaj mi (vidu fotonsur la antaŭa numero) denove buse veturis al Maidstone por vidi ties "Preĝejon de ĉiuj Sanktuloj".
Kiel postsemajnfina programo, aŭtobusa ekskurso kondukis nin ptm. al Rochester. S-ino BUCKLE gvidis nin kaj montris al ni la neforgeseblajn vidindaĵojn de tiu bela urbo: la muzeon pri Charles Dickens, la imponan katedralon kaj la normandan feŭdan kastelon.
Vespere, ni konversaciis kun belgaj samideaninoj: S-ino DE BAETS kaj F-ino WILLEMS, el Bruĝo.
Fine, mardon la 6-an, la reira vojaĝo estis feliĉe pli trankvila ol la ira.
Ni multege dankas niajn britajn geamikojn pro tiu bone organizita semajnfino. S-ino BUCKLE faris multon kaj estas gratulinda.

J. DUCROCQ.

---

## DIVERSAĴOJ

Ĉe la fakultato de Aix-en-Provence prof. Michel DUC GONINAZ denove gvidos ĉiusemajne E-kursojn.
Pri tiu ĉi fako, la studentoj rajtas trapasi universitatajn ekzamenojn, kiuj validas por la diplomo D.E.U.G.

Fine de septembro, Kultura Centro Esperantista organizis en "La Chaux de Fonds" (Svislando) tritagan kursosesion pri la bazaj verkoj: Fundamento, Plena Vortaro de Esperanto, Plena Analiza gramatiko kaj Lingvaj Respondoj. Prezentis la prelegojn/respektive partoprenis la diskutojn: G. WARINGHIEN kaj R. BERNARD (Francio), C. GACOND, C. PIRON kaj G. SILFER (Svislando) kaj R. ROKICKI (Pollando), k.a...

Pli proksime, nome en Valenciennes (Francio), ĉe C.E.S. Eisen, malfermiĝis elementa E-kurso, sabate 10-an de okt. Instruas S-ino DURANDEAU, la kolegiestrino.
Eklernis pli ol dudek, el kiuj pluraj instruistaranoj.
Kuraĝiga komenco...
"La Voix du Nord" dufoje heroldis per trafaj varbartikoloj.

La francaj ĵurnaloj: "La Voix du Nord", "Nord-Eclair","Nord-Matin" kaj "Le Matin" detale raportis pri la internacia TEJO-seminario el naŭ naciecoj.
Pri la sama temo elsendis "Fréquence Nord" kaj "Libera Radio Lille".

La ĵurnalo "La Voix du Nord" raportis la 8-an de septembro pri la apero de "Tinĉjo" en E-o.

La nova Esperanto-poŝtmarko:



Eldontago: 26 julio 1981.
Eldonkvanto: 1,5 milionoj.
Nominalo: 7 reis.
Koloroj: verda/griza/nigra.
Folio da 50 p.m-j.

UTK = unuataga koverto.
la poŝtaj UTK havas dorsflankan numeron.
La p.m estas surstampita per nuliga unuataga stampo kun la teksto: "Primeira Dia de Circulacao-Brasilia-DF-26 jul 81".
Apud la p.m situas poŝta memoriga stampo en diametro de 31 mm kaj tekstas: 66-a Congresso Mundial de Esperanto. 26a 31/7/81 ECT Brasilia DF. En la mezo de la stampo: Esperanto-stelo.
La surpresita teksto sur UTK:
66a Congresso Mundial de Esperanto
1a dia de circulacao.
Empresa Brasileira de Correios e Telegrafos.

En siaj filatelaj rubrikoj, francaj kaj alilandaj gazetoj anoncis la eldon-programon de la belgaj poŝtoj kaj i.a. menciis la emision de Esperanta poŝtmarko, lige kun la Universala Kongreso okazonta en Antverpeno (24-31. VII. 82).

La faka katalogo "Neudin" (eld.82) dediĉas du paĝojn al Esperantaj poŝtkartoj (p.135/136), laŭ tri kategorioj: pioniroj, Francio, eksterlando. La liston ilustras malnova poŝtkarto dulingva pri Le Mans (Francio).

Alain DAWSON verkis por "Etnismo": "Ignorata etno : la Pikardoj".

"Konado de proverboj estas necesa por la perfekta konado de la lingvo"

PROVERBARO FRANCA-ESPERANTA . Kompilis Lucien BOURGOIS.

- Pauvreté n'est pas vice.
  Malriĉeco ne estas malvirto z
  Manko de oro ne estas malhonoro z

- Péché avoué est à moitié pardonné.
  Filo konfesis - Patro pardonis/forgesis z
  Pekinto pentas, kolero silentas z
  Post konfeso venas forgeso

- Personne n'est infaillible.
  Eĉ en sanktulo troveblas makulo
  Eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj z
  Eĉ kiu plej bone pafas, iam tamen maltrafas z
  Eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas z
  Peko kaj eraro estas ecoj de l'homaro z

- Petit à petit, l'oiseau fait son nid.
  Iom post iom, la birdo konstruas sian neston
  Al pec' pecon algluas, kiu neston konstruas z

- Petite pluie abat grand vent.
  Pluveto kvietigas ventegon

- Les petits cadeaux entretiennent l'amitié.
  Donacetoj subtenas amikecon z

Petits enfants petits tourments, grands enfants grands tourments.
  Malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron z

- Les petits ruisseaux font les grandes rivières.
  El malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj z
  Rivaretoj fluas al riveroj z
  Maro estas gutaro
  Se gut' al gut' aliĝas, maro fariĝas z
  Ĉiuj milionoj konsistas el milonoj z
  El multaj milonoj fariĝas milionoj z

- La peur grossit les objets.
  Antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo z
  Timo havas grandajn okulojn z
  Tra vitro de teruro pligrandiĝas la mezuro z

- La peur n'évite pas le danger.
  Ameno diablon ne forpelas z

- Pierre qui roule n'amasse pas mousse.
  Ruliĝanta ŝtono muskon ne amasigas
  Kiu konstante lokon ŝanĝas, neniam sin aranĝas z
  En ĉiu translokiĝo estas parto de ruiniĝo z

- Plaie d'argent n'est mortelle.
  Mono perdita, nenio perdita z
  Perdo de mono estas riparebla

- Pluie d'avril vaut fumier ou purin de brebis.
  Pluvo en aprilo - por la tero utilo z

Le gérant responsable : Lucien BOURGOIS - 25, rue Gambetta
Teknika prizorganto: Robert LEFEBVRE. 62950 Noyelles-Gogault.

IMP. HENRARD - Hénin-Beaumont